



ABONPREZO:

por Bulgarujo—30 leva
 Por Eksterlando—2 sv. fr. Aparta n-ro 4 lv.

ANONCPREZO:

Komerconcoj—2 lv. kv. cm.; koresponda—10 lv.

ADRESO:

Redaktejo kaj Administrejo str. „P. Maglov“ 4
 RUSE telefon 553.

Redaktoro: IVAN KOTOV.

BUDAPEST, URBO DE NIA XXI-A



La reghino de la Danubo invitas kaj atendas vin. Pretighu amase gin viziti.
 (Vidu la klarigojn sur pagho 92)

Geo Milev

Pluvo

Ho pluv, ho pluv, abunda kaj funebra
 — dancanta akvo sur la trotuar!—
 Senzorga, nuda kaj ebrie febra
 — kun nigra tamen mask — vi dancas la sensenean dancon de la kor amar.
 Ho gaj maskita! Vi, per gaj maskita, ho dolor!
 Ho gaja rid! kaj danco che singultoj de cimbaloj!
 — kaj blanka pluvo lumiganta la vesperon — en malluma hor
 naskita. Pluvo! — arlekeno en funebraj karnavaloj!
 Vi flugas — rido kaj radioj — kaj vi estas blanka kaj sensagha, vanta.
 — dancanta akvo sur la trotuar!—
 Vespera pluv — en brua danco sin portanta de l'urbo super la
 funebra nigra char!
 trad. Miti.

Elisaveta Bagrjana

Juneco

Tedis al mi, panjo, tiu sklava sorto
 en kortego mastra, che orplenaj kestoj —
 mortkovrilo estas tiuj silkaj vestoj, —
 tedis al mi pezajn chirkaŭkolojn porti,
 sub multkosta kufo la okulojn kashi,
 pro la braceletoj manon ne ekmovi,
 pro arghenta zono klini min ne povi,
 time ekrigardi, malrapide pashi. . .
 Juna — mi deziras la junecon ghui, —
 oro — mia korpo, silko — miaj haroj,
 la mastrina digno — en la vid la fajroj.
 Chu juneco, panjo, sen fin daŭradas?
 — Levi sin matene, balai la korton,
 flugi al kamparo — por mi tro malvasta —
 rikoltilon kapti, kaj ekkanti laste —
 ke ekstremu tiu plata kamp Zagora! . . .

trad. Miti.

Pancho Mihajlov**MACEDONIO**

Mi amas ghin.

Ghin —

Macedonio'n

La virgulinon, kun la malhelaj migdalokuloj, sur kiuj la
larmoj neniam sekighas.

La virgulinon, kun la malkvietaj funebraj haroj, per
kiuj estas chirkaŭplektita mia animo.

La virgulinon, kun la bona orkoro, kiu estas en mia koro

O! kial shi neniam ridetas!

Kial konstante iras kun klinigita kapo!

Kial portas chiam la pezan krucon de la sufero kaj la
mallibereco!

Chu, chu ne povas ankaŭ ghi kiel la aliaj esti libera!

Esti ornamita nur per la blanka rozo de l'ghojo—

Kaj disdoni, disdonadi de sia animo al chiu lacigita kaj
malsata! . . .

Mi amas ghin

Ghin —

Macedonio'n

trad. Iv. Hr. Pushkarov

N. V. Rakitin

* * *

Animo mia monahejo estas
Sin kiu en dezertangulo nestas.

La revoj miaj—Kiel sur la muroj

Malnovaj kaj malhelaj sanktfiguroj.

Esperoj miaj estas vaksandeloj

Delonge estingitaj en kapelo.

La sonorado dum vesperaj horoj

La mortajn revivigas rememorojn.

Samkiel monahinoj, venas aroj

Da belvizioj el infanaj jaroj.

Animo mia monahejo estas

Sin kiu en dezertangulo nestas.

Tradukis S. D.

Kost. Konstantinov.

La kanto de l'pluvo.

Chu vi aŭdas la gajan antaŭprintempan pluvon, kiu frapas sur la vitrojn kaj tegmentojn kaj kiu rapide forpasas, kiel neglekta antaŭsciigo?

Chu vi aŭdas la brueton de l'paseroj, kiuj aflugas sub vian tegmenton, -- flirtas kaj bataletas -- chi tiun nemortantan simbobon de la vigleco kaj vireco!

Chu vi ne perceptas en via koro la malklaran tremon, pri io nova kaj granda, kiu venas?

Rigardu: -- varma vaporo sin portas super la vastaj kampoj, ghoje brilas la oraj kupoloj, kaj nokte la chielo estas profunda kaj nigra kun malgrandaj kaj grandaj steloj. . .

Enaŭskultighu: -- resonas la ambosoj, la vegetajhsuko surpriras sur la sekaj branĉoj, kaj la shelo facile krevas. Ekkante larmas la tegmentoj pro la fluidighinta negho, bruas la fluoj kaj torentoj, kaj ili trenas la kolektitan vintran balaaĵhon. Ie krakas la grandegaj glacioj, sin kolektas lavangoj, forbalaas chion -- kaj la eko atingas vin.

Varmetaj fluoj karesas vian vizaghon, kiel memoro de l'kiso. Sur la montrofenestroj ridetas fruaj hiacintoj. Travidebla vualo chirkaŭkovras Vitoshon. La tero fleksighas sub viaj pashoj, kiel vigla korpo.

Chu vi ne sentas, ke ghi jam venas ghi -- la atendata, facilpashanta feino kaj ke rapide ghi ornamas la mondon per siaj blankaj kaj pale-rozkoloraj standardoj -- ghi, la geedzigho de l'chielo kun la tero?

Kaj ke la grandaj gutoj de l'pluvo, kiel petolaj charoj, senditaj de la edzighof stantoj, frapas sur via fenestro kaj kantas tiun kanton: --

„Ni venis vin vekti de via peza dormo. Chu preta jam vi estas?

Dum la longaj tagoj, kiam la nebuloj plaŭdis super viaj shultroj kaj klinis via kapo malsupren; dum la longaj noktoj kiam timo mallarghigis vian koron -- malgraŭ tio, en la profundajhoj de via animo bruletis flamo: vi atendis aliajn tagojn, vi kredis je la suno. Ni alvenis vin memorigi pri ghi.

Tra nia brila reto ghi ludas je gajaj leporetoj sur la muroj de via chambro. Ekrigardu tiun chi serenon chielon,

ekrigardu tiujn chi crajn kaj blankajn nubojn, kiuj naghass
senbrue—ekrigardu la bluan vastan malproksimon kaj ekghojegu!

Levu vian sulkighintan frunton, demetu viajn pezajn vestojn, kiuj malhelpas al viaj manoj, englutu profunde en vian fortikan bruston la serenon de l'nova mateno! Malfermu chiujn fenestrojn de via animo, flirtu la pezaj elspirajhoj, enighu maro da fresho kaj ghi tralavu la restajhon de l'nigraj tagoj! Tiom da suferoj elportis via koro—chu hodiaŭ ne estas loko en ghi por la ghajo? Aŭ enprofundighinta en vi, vi forgesis la tutmondon, kaj ghin vi neis? Aŭ super la nuboj vi serchas la perditan paradizon?

Ekrigardu:—al festo ni vokas vin—al la supera festo de l'geedzigho kaj komenco! La chielo flate ridetas super la tero inspirita kaj enamighinta kaj sin spegulas en chiu marchon, en chiu okulo. En patrina ghajo vibras la tero kaj atendas. Nova vivo ghermas, kaj super la putrinta foliaro floras puraj galantoj.

Al festo ni vokas vin—la granda festo kreado! La vivo ne estas amuzo, ne estas malesperigho kaj songho. La vivo estas multekosta brodajho de Laboro kaj Ghajo. La vivo estas benita Devo kaj ghi atendas vin. En chi sankta harmonio de la naturo, chu nur vi restas senpartoprena? Vidu viajn muskolojn elastajn—ekscititajn de la unua potenco de l'tero, kiujn ghi nutris. Ghi donu al vi tiun chi vivan forton, donu al vi sian kreadan penson, donu al vi sian inspiron.

Kaj en la malvigla koro de la tero, eksonu ankaŭ via animo, kiel kupra sonorilo—ame aŭ indigne.

Ekrigardu: kiuj estaj chirkaŭ vi, kaj kiuj anstataŭas vin? Chu tiuj chi—kiuj kun rideto ekrigardas vian palan vizaghon kaj vian eluzitan kolumon? Chu ili estas viaj fratoj? Chu ili estas idoj de la tero? Chu ghi atendas ilin dum sia festo? Chu ili ne amas pli la multekostan parfumon—ol la odoron de l'grajnebla tero aŭ de l'florantaj tilioj? Chu por ili ne estas pli kara la brilo de la opalo, ol la pala chielo de vialando? Chu ili ne preferas la bilardan bastoneton, ol la pezan martelon kaj skulptilon? Chu iliaj rigardoj sin ne trenas sur la tero, kiel glueblaj rampajhoj—kaj viaj okuloj ne estas radiozaj, kiel la suno?

Aŭ vi malsuprenigas vian fruntion, senfortan venki vin mem, kaj vi silente delasas vian manon?

Aŭ ankaŭ hodiaŭ vi malfruis por la festo, kaj por vi ne estas loko?

Aŭ nur laŭ la koto de la strato vi komprenis, ke la printempo venis kaj forpasas kaj ĝin vi ne eksentis? . . .

el la bulgara tradukis **St. Masseroff**.

La parabolo pri la chasisto

(3)

— Malsaghulo! Hundo! Freneza lunatikulo! kriegis ili — Kiel vi kuraghis rompi vian kaghon kaj liberigi la birdojn?

La chasisto ekparolis, sed ili rifuzis aŭskulti lin.

— Verol? Kio ĝi estas? Chu vi povas manghi kaj trinki ĝin? Kiu iam ajn ĝin vidis?

La popolamaso furiozis:

— Viaj birdoj estis niaj: ni chiuj povis ghuadi iliajn kantojn. Ha malsaghulo! malnobla rampulo! Ateisto, vi venenigas la aeron!

— Ni shtonmortigu lin! elkriis kelkaj.

— Ne estas nia afero — rediris aliaj — lasu la idioton foriri.

Tiuj foriris, sed la aliaj kolektis shtonojn kaj koton kaj jhetadis ilin sur lin. Fine, estante tre kontuzita kaj vundita, la chasisto shteliris en la arbaron. Estis jam vespero. Li vagadis chiam antaŭen ĝhis la mallumo tute densighis. Li ekstaris jam che la limoj de la lando, kie regas eterna nokto. Li enpashis en ĝhin: en la landon, kie estas nenia lumo. Li palpadis per la manoj; sed chiu brancho derompighis che lia ektusho. La tero estis kovrita per cindroj. Je chiu pasho lia piedo enterighis kaj maldensa nubeto de nepalpeblaj cindroj jhetighis en lian vizaghon. Li sidighis sur shtonon kaj kovris sian vizaghon per la manoj. En tiu chi lando de Rezigno kaj Sinoferado li ekatendis la venon de la Lumo.

Nokto ekstere, eterna nokto. Kaj ekestis nokto ankaŭ en lia koro. El la marchoj levighadis malvarmaj nebuloj chirkaŭantaj lin. Maldensa nevidebla pluvo faladis en la mallumo kaj grandaj gutoj kolektighadis sur liaj haroj kaj vestoj. Lia koro malrapide batetis kaj sensenteco ekobsedis lian korpon. Tiam, levinte iom la kapon, li vidis du gaje dancantajn lumetojn, kiuj pli kaj pli proksimen venis. Ili dancadis kiel varmaj

fajrobrilaj steloj. Fine ili staris antaŭ li. El la mezo de la radianta flamo de la unua rigardis ridanta virina vizagho, kaveta kaj kun flankenpendanta hararo. Meze de la alia estis gajaj ridondetoj, simile al globetoj sur vinglaso.

Ili dancadis antaŭ li.

— Kiuj vi estas — demandis la chasisto — kiuj venas sole al mi en mia izoleco kaj mallumo?

— Ni estas la dunaskitoj Volupteco — ili ekkriis. — Nia patra nomo estas Humaneco kaj la patrino — Ekceso. Ni estas malnovaj kiel la montoj kaj riveroj mem kaj maljunaj kiel la unua homo. Sed ni neniam mortas — ekridis ili.

— Ho, mi chirkauvolvigu vin per miaj brakoj! kriis la unua. Ili estas molaj kaj varmaj. Via koro glaciighis, sed mi igos ghin denove ekbati. Ho, venu al mi.

— Mi envershos mian varmegan vivon en vin — diris la dua — mia cerbo estas sensenta kaj miaj membroj estas nun mortintaj, sed ili ekvivos libere, pasie.

— Ho, mi envershu ghin! . . .

— Ho sekvu nin — ili ambaŭ ekkriis — venu kun ni. Pli noblaj homoj ol vi estis kaj atendis en tiu chi mallumo. Ili tamen sekvis kaj neniam plu forlasis nin, neniam! Chio cetera estas iluzio; nur ni estas vivo. La vero estas ombro; valoj de supersticho estas farso; La tero estas el cindro, la arboj chiuj putraj, sed ni — tushu nin! — ni vavas. Vi ne pevas pridubi nin. Palpu nin, kiel varmaj ni estas.

Ho venu, venu kun ni!

Pli kaj pli proksimen ili cirkaŭis lian kapon kaj malvarmaj gutoj aperis sur lia frunto. La brila lumo frapis liajn okulojn kaj preskaŭ blindigis lin. Ekludis en li la glaciighinta sango kaj li diris:

— Jes. Kial mi devas morti en chi tiu terura mallumo? Ili estas varmaj, ili fluidigos mian jam glaciighintan sangon.

Kaj li preskaŭ estis etendonta siajn brakojn por chirkaupreni ilin. Sed tuj aperis antaŭ li la bildo de tio, kion li amis, kaj la brakoj mallevigis.

— Venu, ho venu kun ni! admonis ili.

Sed li kashis la vizaghon permane.

— Vi ravas la okulojn miajn — ekkriis li — vi varmigas

mian koron, sed mi ne povas fordoni tion, kion mi tutforte deziras. Mi atendas chi tie, ghis la morto mi atendas, Iru vi for de mi!

Li mallevis rezigne la kapon kaj rifuzis aŭskulti plu. Kiam li relevis ghin, ambaŭ lumetoj aspektis kiel du trembrilantaj steloj, malaperantaj en la malproksimon.

Ankaŭ tiu — chi longega nokto forpasis en la eternecon. Chiuj, kiuj forlasas la valojn de supersticoj trairas tiun landon de l'mallumo. Kelkiuj trairas ghin dum malmultaj tagoj, kelkiuj vagadas en ghi monatojn, aliaj — tutajn jarojn, kaj kelkaj mortas en ghi.

Fine che la horizonto aperis malklara lumbrilo. Kaj la chasisto levighis por sekvi ghin. Kiam li fine atinghis — tiun lumstrion antaŭ li ekestis plena, rava, longesopirata sunbrilo. Kaj la chasisto enpashis en ghi. Kaj antaŭ li staradis la potencaj montoj de Severaj faktaj kaj Realeco. La hela suno briladis sur ili kaj iliaj suproj dronadis en nuboj. De la mal-supro etendighis kaj suprenserpentumis multaj vojetoj. Krio de l'ghojego elshirighis el la brusto de l'chasisto. Li elektis la plej rektan kaj kuraghe ekgrimpis. La rokoj kaj altajhoj resonigadis lian kantadon. Oni troigadis la malfacilecon. La monto ja ne estas tro alta kaj la vojo ne tiom kruta. Post kelkaj tagoj, aŭ semajnoj, aŭ pleje monatoj, li ekpashos la supron. Ne nur unu plumon trovos li; sed kolektos li chiujn kiujn aliaj homoj trovis kaj reperdis; teksos la reton, kaptos la veron, tenos ghin firme, tushos kaj palpos ghin per siaj manoj — chirkaŭprenos ghin. Li ridadis ghojanime en la sunbrilo kaj laŭte kantadis. La venko jam estas tre proksima.

Post iom da tempo tamen la vojeto komencis plikrutighi. Li bezonis ciujn fortojn por la grimpadaj kaj kantoj ne plu aŭdighis. Amblaŭflanke de l'vojo vidighis grandegaj nudaj aŭ muskokovritaj rokoj kaj en la lafosimila tero profundegajhoj gapis. Tie kaj tie li vidis brilon de blankaj ostoj. Nun la vojeto farighis pli kaj pli malfacile videbla, ghis fine tute malaperis. Nun la chasisto vidis sin devigata mem ekfari vojeton por si, ghis li atingis kolosan rokmuron, glatan kaj seninterrompe etendighantan ghis nevidebleco.

— Mi konstruos shtuparon sur ghi kaj grimpinte sur la muro mi estos sur la supro diris al si brave la chasisto kaj eklaboris (daŭrigota)

TRA ESPERANTUJO

ERLANDA MOVADO

Burgas. La Esperantista societo „Nigra Maro“ malfermis 2 kursojn: la unuan en la salono de vegetara restoracio „Jasna Poljana“ gvidatan de s-no Simeon Angelov, kaj la duan en la Abstinencula klubo sub la gvido de s-no Kirjak Kostov. Esperantista renkontejo: Vegetara Restoracio „Jasna Poljana“

La loka societo nepre deziras kunvoki la sudbulgaran konferencon en sia urbo.

Adreso de la societo: Atanas Nikolov, str. „Car Ivan Shishman“ 19

Vil. Batichnica (Belensko) La 8 Il 1929 fondighis nova esperantista Societo sub titolo „Vilagha vocho“ Oni elektis komitaton el jenaj personoj: Marin Iv. Bardarov – prezidanto, Jordan G. Slavchev – vicprezidanto, direktoro de la progimnazio, Stefan Mandov – sekretari-kasisto, instruisto; kontrola komisiono: Trifon G. Slavchev instruisto, Eshref Mollov, instruisto kaj Dimitr Novakov – barelfaristo. Konsilantoj: Petko Noev kaj Mehmed Hasanov. La societo kunvenas chiuvendrede je la 6 h v. en legejo „Probuda“.

Vil. Dolna-Banja (Ihtimana). La societo „Verda lumo“ laboras tre vigle. Funkcias 2 kursoj. La unua por komencantoj vizitata de 25 p. Inter la kursanoj partoprenas grizharuloj, pensionuloj, eksinstruitoj. La duan superan kurson partoprenas 8 personoj. Granda intereso al esperanto regas che la progimnazilernantoj, tamen la direktoro ne kuraghas la komencighon de esperanto – kursoj. Baldaŭ aranghota teatrospektaklo.

Vil. Hajredin (Orexova) Funkcias esperanto kurso.

Ruse Esperanto societo „Solidareco“ estas legataj chiumerkrede referajhoj en la lernejo de Angel H. Oglu.

Rahovo La loka societo vigle eklaboris. La 14. I. j. k. estis aranghita amuzvespero; s no Stanev parolis pri la neceso de internacia lingvo kaj ghia utilo. Dum la danevespero ludis la societa orkestro. Funkcias kurso gvidata de s-no Docho Dimitrov kun 25 p. Diligente kaj efikplene agas la societo. La kurso estis anoncata imitinde per projhehtado en la kinejo, adreso: Georgi Stanev, str. Kiril Metodi.

Samokov. Funkcias kurso.

Stara Zagora. La esperantista societo „Verdstelano“ la 10. Il. 1929 reorganizighis. Oni elektis novan komitaton: Ingheniero Trikjakin prezidanto, Slavi Janulov – sekretarikasisto. Kontrola komisiono: Ivanka Koeva, Pencho Vasilev kaj Iv. Cvetkov. Adr.: Slavi Janulov str. „Sveta Troica“ 168 St.-Zagora.

Shumen. La 7-an de Januaro societo „Vekigho“ okazigis brilan vesperfeston. Partoprenis la multista muzikistaro, la loka kanthoro „Rodni zvuci“. La societo esprimas dankon al la partoprenintoj.

M. Tirnovo. Funkcias esperanto-kurso. La societo „Frata amo“ aranghis la 8-an kaj 13. 1. 1929 literaturvesperfestojn.

La duan de decembro okazis la jarkunveno de la loka societo. La raportoj evidentigas intensan agadon de l'organizajho kaj bonajn rezultojn en kultura rilato. La gvidita en la societejo kurso bone sukcesis, malgraŭ kelkaj malhelpoj. Pasintan vintron estas aranghitaj tri amuzfestoj. La unua rezultigis puran gajnon de 900 lv. La puran gajnon de la dua festo la societo donacis al la loka legexo por ornami la scenejon. La sumo 550, gajnita el la tria, estas uzita jene: 100 lv. por la suferantoj de la tertremo, por la blindaj esperantistoj 50, por „Savo“ —50, per 150 lv. estas mendita ekspozicia materialo.

Jarenspezo 1968 lv. elpezo—1068, enkase—900, 30 membroj —10 regulaj kaj 20 helpaj.

Estas elektita nova komitato, konsistanta el: Kiril Perfilov — prezidanto; Nikola Dolapchiev — sekretari-kasisto.

Stanimaka. La loka societo „Signo de l'espero“ okazigis la 10-an de marto gravan kunvenon en kiu estis pritraktata la demando pri sudbulgara konferenco. Konsiderante tian konferencon treege grava kaj urgha, la societo decidis aranghi ghin en sia urbo.

Pro tio estas insiste petataj la societoj kaj esperantaj grupoj povontaj aŭ intencantaj partopreni tiun tre gravan konferencon, anonci sin kiel eble plej baldaŭ al la loka societo.

Adreso: David Sasonov

Svilengrad La Esperantistoj renovigis la esperanto-societon „Aŭroro“ la 28. 11. 1929. Oni elektis jenajn personojn en la komitato: Jvan Dimov — prezidanto, Kosta Tringov — sekretario, Aleksandr Georgiev — kasisto, kontrolkomisiono: A. Vodenicharov, Vesa Vodenicharova kaj D. Valchev.

V. Staliska Mahala-Lemsko. La jhus malfermita kurso kun kelkaj personoj sub la gvidado de s-ro Georgi Haghi Georgiev promesas bonan rezulton pro la granda entuziasmo. Kaj tra la vilaghaj stratoj oni komenci aŭskulti la mildajn sonojn de nia kara Esperanto.

EKSTERLANDA MOVADO

Pollando. Dank a la senlaca kaj intensa laboro de la delegito de U. E. A. s-no Shapiro la Ministerio de popola instruado post longa prokrastado konsentis la enkondukon de esperanto en la lernejsprogramon kiel fakultativan objekton. Sekve de l'ministeria cirkulero nun en Bialystok esperanto estas instruata en 18 lernejoj krom en la aliurbaj lernejoj.

Rumanujo. Giurgiu. La fervora delegito de U. E. A. s-no Stefano Koch gvidas esperanto-kurson che la komerca lernejo kun la partopreno de 40 lernantoj.

16^a Bulgara Esperanto — Kongreso

Lom * de julio 1929 * Lom

Estimataj gesamideanoj,

Unufoje dum la ekzistado de Esperanto—movado en Bulgarujo la Lom'aj geesperantistoj estas felichaj kaj ghojaj inviti vin, ke vi partoprenu la tiun chi jaran kongreson, kiu pruvos al la tuta bulgara socio nian rajton pri batalo por justeco sur la lingva kampo, nian forton kaj niajn argumentojn. Per amasa cheestado ni chiam povas esti fieraj kaj fortaj kaj rompos la mallumajn embarasojn, kiuj nin dividas de la vera vivo en gloro, char, bedaŭrinde, nia movado ankoraŭ ne estas sufiche granda potenco, ke la socie povu akcepti Esperanton kiel veran internacian lingvon, sed ni estas certaj, ke nia estas la estonteco kaj ni venkos. Nia venko dependas nur de ni mem kaj ni devas akiri pli kaj pli grandan forton, pli kaj pli vastan regionon por uzado de Esperanto rigardante al ghi pli praktike

Karaj gesamideanoj,

La Lom'a movado travivis grandan nedeziritan krizon kaj vi scias, ke, dum la pasinta jaro, nia societo estis malpermesita, ghiaj membroj disigitaj kaj per granda kaj superforta peno ni sukcesis denove organizi nin, sed ankoraŭ estas tre malfortaj, sen influo en urbanaj rondoj. Via partopreno en la kongreso venos ne nur kiel subteno de nia movado, sed ankaŭ kiel pruvo de nia ekzistado kaj de nia forto kaj tiamaniere vi helpos al nia societo aparte kaj al la tuta Asocio ghenerale

Lom estas interesa ankaŭ pro sia komerca vivo, pro sia chednuba haveno kaj pro sia cirkaŭajho kaj la pasigo de la kelkaj kongresaj tagoj en ghi, restas por chiam neforgesebla rememoro en la vivo de chiu esperantisto. Pri la marskado de la organizaj aferoj vi atentu la sekvontajn kongresajn bultenoj, aperontaj en „Bulgara Esperantisto“.

Per tio ni havas la honoron tutkore inviti vin al partopreno kaj ni firme esperas, ke nia alvoko ne restos senrezulta. Atendante vian jesan respondon ni salutas vin samideane.

Lo-ko-ko

Kongresa bulteno № 1

La loka kongresa komitato jam estas elektita kaj ghi konsistas el:

- 1) Georgi Haghi Georgiev, prezidanto kaj gvidanto de la ekspozicio kaj propagando.
- 2) Filip Iliev,—sekretario
- 3) Ceko P. Petkov, kasisto kaj gvidanto de la ekskursoj
- 4) Vladimir Vojnikov ano " " " " loghejoj
- 5) Cvetan Mandev " " " " amuzoj kaj loto
- 6) Cvetana Georgieva " " " " ornamajhaferoj
- 7) Simeon Nenov " " " " helpanto.

Loka kongresa komitato petas chiujn spertajn gesamideanojn bovolu sendi sian opinion kaj konsilon pri la arango de chi-jara kongreso, char nur tiel, per komuna forto, ghi povas esti vera festo kaj triumfo de nia lingvo. Tiujn-chi skribajhojn direktu al la persona adreso de la prezidanto: Georgi Haghi Georgiev, muelejo „Izgrev“. gara Staliska Mahala—Lomsko.

La adreso de Lo-ko-ko estas: Ceko P. Petkov, la poshtejo, Lom, 4. 3. 1929

Lo ko ko.

СВЕДЕНИЯ

ЗА КОНГРЕСИТЪ

1. Нашиятъ XVI конгресъ ще се състои въ крайдунавския градъ Ломъ презъ последнитѣ дни на м-ць Юлий. Точната дата ще се съобщи допълнително следъ като стане известно новото параходно разписание на Дунавската навигация.

За всички необходими улеснения, намаления за пътуване по Б. Д. Ж. и дунавскитѣ параходи, разрешаване отпускъ и пр. ще бждатъ направени своевременни постъпки отъ Ц. К. За подробности да се следятъ „la bultenoj“ на конгресния комитетъ, които ще се помѣстватъ въ „Bulgara Esperantisto“.

2. Международниятъ XXI конгресъ ще се състои въ Будапеща отъ 2—9 августъ н. г. За сега се разполага съ следнитѣ сведения за него:

а) Kotizo-то за всеки конгресистъ е 700 лв. споредъ днешния курсъ. Платилия „kotizo-то“ има право на всички конгресни отстъпки, предимства, бесплатно получаване на „Hungara Heroldo“, конгресни документи и пр.

Квартири:

хотели: I класа съ закуска— 240 лв. дневно.

II „ „ — 192 „ „

III „ „ — 144 „ „

IV „ „ — 96 „ „

Общи жилища: въ студентски домове, училища и пр.

съ храна за цель день — 84

безъ храна „ — 30

Храна: обѣдъ — 36 лв., вечеря — 48 лв. Посо-

ченитѣ цифри сж приблизителни.

Адреси: 1. За писма и телеграми—Esperanto Kongreso Budapest. 2. плащания съ пощ. записъ, банковъ чекъ или препоръчано писмо до секретаря Paulo Tolnai. Budapest. VII Bethlen ter 2 или въ конгресната банка: Peshta Hungara komerca Banko (Pest Magyar kereskedelmi bank) V. Tisza Istvan и 2, която има банкови сношения въ всички страни. Съюза е издествувалъ общъ паспортъ. Подробности въ идущия брой.

Тръгването ще стане отъ Ломъ непосредствено следъ нашия конгресъ.

Сведения, които интересуватъ всеки единъ по отделно, както за нашия, тъй за международния конгресъ да се искатъ отъ Съюза, прилагайки се пощ. марки за пощ. разности.

Секретарь: Капитанъ Ст. Радевъ

СПИСЪКЪ

НА ПРИСЪЕДИНИЛИТЪ СЕ ДОСЕГА Д-ВА НЪМЪ СЪЮЗА

1. Еспер. д-во „Brilanta stelo“ с. Дичинъ (търновско) адресъ: Борисъ П. Тоневъ.
2. Еспер. д-во „Espero“ с. Хайрединъ (орѣховско) адр.: Асенъ Игнатовъ.
3. Еспер. д-во „Frata-amo“ М. Търново адресъ Никола Долапчиевъ.
4. Еспер. д-во „Kulturo“ Пловдивъ адр. Ив. Шиваровъ ул. Карловска 134
5. Есер. д-во „Lumo“ с. Горско Сливово (Севлиевско) адр. Ганчо Желѣзковъ—учителъ.
6. Софийско еспер. д-во София, адр.: Лавеле-Любинска. (Глобусъ).
7. Еспер. д-во „Solidareco“ Русе. адр. ул. „Пенчо Мъгловъ“ 4.
8. Еспер. д-во „Signo de l'Espero“ Станимъка адр.: Кръстю Георгиевъ-чинов, Мирови Сждъ.

9. Еспер. д-во „Radio“ Самоковъ, адр.: Борисъ М. Босевъ ул. Житна 153
10. Еспер. д-во „Verda Ondeto“ Созополъ адр.: Никола Русевъ, Рибарско училище.
11. Еспер. д-во „Verda lumo“ с. Долна-Баня (Ихтиманско) Т. Стояновъ у-ль.
12. Еспер. д-во „Radio“ Т. Пазар, адр. Жакъ Бехаръ магазинъ Есперанто.

Внимание, български есперантисти!

Есперантскиятъ речникъ е подъ печатъ.

За улеснение изплащането му отстъпямъ следнитѣ издания на половинъ цена:

Българска Антология—избрани български разкази и стихове на есперанто, съ портрети, отлична читанка и най добъръ подаръкъ за чуждестраннитѣ ви кореспонденти, вмѣсто 100 само за 50 лева.

Българската страна и народъ, съ цвѣтна етнографическа карта, на есперанто, субсидирана отъ Външното министерство, 50 лева.

Отъ близкия изтокъ, съ цвѣтна етногр. карта, на есперанто, на изчерпване 35 лева.

Сжщностъ и бждащностъ на идеята за единъ международенъ езикъ, най добрата езикова студия на Д-ръ Заменхофъ, авторизиранъ преводъ на български, 6 лева.

За международния езикъ, анкета между наши учени и писатели, на български, 4 лева.

Букетче отъ 7 разнострани разкази на еспер 15 лв.

А всички заедно купени само за 150 лв. при наши разносни препоръчано. Побързайте съ поръчкитѣ си.

Адресъ: Ив. Кръстанов, ул. Аспарухъ 26 София.

ANONCETOJ

Germana s-no Erich Schipke-kompostisto Görlitz (Silezio) Neugasse 31 Germanujo, deziras intershanghadi P. M. kun gesamideanoj alilandaj, precipe el Bulgarujo. Nepre respondos.

Stefan Bonchev lernanto, Sliven, str. Mangarska 734 deziras korespondi kun bulgaraj kaj fremdlandaj gesamideanoj. Certe respondos.

Fraŭlo Trendafil Apostolof, vil. Bistrica (Berkovsko).

Bulgarujo, deziras korespondi kun eksterlandaj gesamideanoj pri diversaj temoj.

Fraŭlo Eliezer S. Semov ladisto, Tatarpazarghik, str. Knjaz Aleksandr 11, diriras korespondadi nun en kaj eksterlandaj gesamideanoj je diversaj temoj. Respondos nepre.

FILATELISTOJ!

Mi posedas grandan kvanton da poshtmarkoj, tre valoraj francaj, transoceanaj kaj de diversaj kolonioj. Mi interchangas kun chiuj landoj ilustritajn vidajhkartojn de Parizo, Versailles, Monaco, Nizza k. a.

Adr. S-no Joseph Prouzat, 2 Place St. Symplorien 2 Versailles (S et O). Francujo.

СЪИДЕЙНИЦИ!

Поради технически причини отпечатването на албума закъснѣ, за което молиме извинение.

Последниятъ се вече печати и веднага следъ като бжде готовъ ще Ви се изпрати.

DANKESPRIMO

Mi esprimas la plej korajn dankojn al la britaj geesperantistoj, kiuj tiel afable kaj gastame ebligis al mi viziti ilian landon dum tri monatoj, konatigi ilin kun niaj lando kaj popolo kaj konatighi kun iliaj moroj kaj kutimoj.

Baldaŭ aperos mia „Tra Eŭropo per Esperanto“, okaze de mia 25 jara esperantisteco, kie oni legos pli detale la travivaĵojn per nia kara lingvo.

Iv. H. Krestanov L. K.

el Pirdop.

Бюджетни бележки

РАВНОСМЪТКА

За прихода-разходитѣ на Съюза отъ 1 VIII 1928 година до 28 февруарий 1929 година включително.

П Р И Х О Д Ъ

1. Отъ чл. вноски	4992— лв.
2. Отъ стоки	4484— "
3. Абонам. В. Е.	16297— "
4. За зел. седм	290— "
5. За „К. Р.“	1370— "
6. Отъ дебитори	166— "
7. Непредвидени	2458950 "

Всичко: 52118.50 лв.

Р А З Х О Д Ъ

1. За В. Е.	8928 — лв.
2. За зел. седм.	— ”
3. На кредитори	6053.50 ”
4. Непредвидени	11634 — ”
5. Наемъ канцелария	3000 — ”
6. Канц. разходи	4481.30 ”
7. Заплати	4500 — ”
8. Осветление и отопление	1000 — ”

Всичко: 39596.80 лв.

Наличности къмъ 1 февруарий 1929 год. 12521.70 лв.

Ф О Н Д Ъ „S A V O“

Отъ брой 6	17249 лева
1. Елиезеръ Семовъ — Т. Пазарджикъ	20 ”
2. Никола Годевъ — с. Бълица (Разложко)	25 ”
3. Ив. Градинаровъ — с. Овча-могила (Свищовско)	10 ”
4. Кирилъ Христовъ — Г. Джумая	15 ”
5. Капитанъ Ст. Радевъ — Русе	50 ”
6. Петъръ Монковъ — Окр. затворъ Ловечъ	50 ”
7. Ив. Ковачевъ — Русе	50 ”

Всичко: 17469 лв.

VII Internacia vegetara kongreso.

La germana ligo por natura kuracarto, higieno kaj memreformo en Chehoslovakujo okazigos en Steinschönau en germana Bohemio kun la internacia Vegetara Unio internacian vegetaran kongreson la 7—11 julio 1929.

Nia lingvo estos uzata plenrajte. Estas nepre dezirinde, ke la kongreso estu amasé vizitita de esperantistoj — vegetaranoj.

Detalojn petu de s-ro Schriftleiter Felx.

Varnsdorf i B. Ch. S. R.

„Antaŭkongreso de la XXI-a“

Solena malfermo de internacia Esperanto-muzeo en Vieno.

La Austria Esperanto Asocio aranghas en Vieno antaŭkongreson de la XXI-a, la 29 VII—1 VIII 1929. Dum oni inaŭguros la Internacian Esperanto-Muzeon, postkio karavano vizitos la kongresurbon de la XXI-a.

Presejo B. N. Maldghieff-Ruse